

La 26an de majo 2015

Marborda regiono de la gubernio Fukuŝima

La 26an de majo “la Asocio de la urbo Maebaŝi por forĵeti ĉiujn nukleajn centralojn el Japanio” organizis busekskurson al la marborda regiono de la gubernio Fukuŝima, kie estas la nukleaj centraloj n-ro 1 kaj n-ro 2 de Fukuŝima. 42 homoj partoprenis en ĝi, do la buso estis preskaŭ plena.



Minami-Soma
20 kilometroj

Namie

La nuklea centralo 1
La nuklea centralo 2

Naraha

Hirono

Iwaki

Mia gubernio Gunma estas najbara gubernio de Fukuŝima, do kiam okazis la nuklea akcidento, nuboj enhavantaj nukleaĵojn flugis al ĝi, do la tero estas ne tre dense, sed fakte, poluita. En la buso du homoj menciis la suferon pro la nuklea akcidento en mia gubernio:

A: Mi estas terkulturisto. Foje miaj legomoj estas pli poluitaj ol la normo, do ilin mi forĵetas.

B: En la urbeto Komoĉi, kie oni produktas teon, post la akcidento tefolioj estas poluitaj. Terkulturistoj perdis esperon kaj iuj jam ĉesis labori.

La gubernio evitas raporti pri poluado pro akcidento, tial loĝantoj, ne sciante la gravecon, feliĉe vivas, sed en efektiveco ilia sano perdiĝas eĉ iomete ĉiun tagon.

Ni veturis laŭ la ŝoseo Ĵooban

Tra la gubernio Toĉigi nia buso eniris en la gubernion Fukuŝima. Inter la urboj Tomioka kaj Namie la ŝoseo estis longe fermita pro la nuklea akcidento, sed la 1an de marto ĝi estis malfermita, tamen la urboj, tra kiuj kuras la ŝoseo, apartenas al neloĝebla distrikto dense poluita. En la parkejo Junotake oni montras, kiel poluitaj estas la respektivaj naŭ lokoj en tiu parto de la ŝoseo:

Minami-Sooma – Namie	1,3,	0,4,	0,2	(mikrosivertoj)
Namie – Tomioka	3,0,	5,6,	1,0	
Tomioka – Hirono	0,2,	0,7,	2,3	

La maksimuma normo, kiun la registaro decidis, estas 0,23 mikrosivertoj, do radioaktiveco en 6 el la 9 lokoj superis la normon.

La buso eniris en la urbon Tomioka. La ciferoj pli kaj pli grandiĝis eĉ en la buso: 0,22, 0,34, 0,45, 0,52.

En la urbo Futaba la ciferoj pligrandiĝis: 0,45, 0,60, 0,80, 1,15 (la plej alta)

Dume en ambaŭflanke de la buso etendiĝis kampoj kun herbaĉoj, domoj sen homoj kaj kvantegoj da poluita tero en plastaj sakoj. La areo de la dezertaj lokoj estas duono de tiu de la Tokia metropolo. Dum multaj generacioj homoj kultivis kaj kultivis la kampojn kun ŝvito kaj produktis bongustajn rizon kaj legomojn, kaj se ne okazintus la nuklea akcidento, la kampoj donas kaj donados al ili kaj al ni benaĵojn de la tero, sed la akcidento preskaŭ eterne perdis al ili tiujn heredaĵojn.

Lastatempe la ministerio de ekonomio kaj industrio denove komencis pledi por malmultekosteco de elektro el nuklea energio. Kiamaniere ili kalkulis la koston? Kiamaniere ili kalkulis la koston de la neloĝebla tero kaj nekultiveblaj kampoj, perditaj vivo, kulturo, trankvilo, espero kaj estonteco? Tiuj perdoj estas nekalkuleblaj. La burokratoj kaj politikistoj, kiuj senhonte pledas por tio, estas tro arogantaj, ne havante homan koron.

Nia gvidanto s-ro Itoo klarigis al ni, fingre montrante kampojn, ke ĉi tiu estis bela kampo, ankaŭ ĉi tiu estis bela kampo, sed sur tiuj kampoj jam komencis kreski salikoj. Tiuj arogantaj homoj ne povas senti malĝojon kaj malesperon de la terkulturistoj. S-ro Itoo diris: “La nuna

registaro ne hezitas viktimigi Okinavon, trudante usonajn militbazojn al ĝi, por plenumi promeson kun Usono, kaj same ĝi ne hezitas viktimigi Fukuŝima-on por pliantaŭnenigi la nukleenergian politikon”.



**Amaso da poluita tero kovrata per plastaj tukoj.
La blankaj kampoj estas jam “senpoluitaj”.**

Ni vizitis rifuĝintojn en la urbo Minami-Sooma

Atendis nin 6 rifuĝintoj (du viroj kaj 4 virinoj) en la kunvenejo de la provizoraj dometoj en la distrikto Uŝikoŝi. Ili ĉiuj estis maljunaj. S-ro Satoo, la estro, klarigis la situacion:



Ambaŭflanke loĝas dek familioj.

En tiu ĉi distrikto troviĝas 379 provizoraj dometoj, en kiuj 800 homoj loĝas. Mi devenas de la vilaĝo Takanokura en la urbo Minami-Sooma. Komence mi rifuĝis en la urbo Kitakata, sed revenis en junio 2011 al la hejmo, do tiun tempon certe mi nemal multe elmetiĝis al radioaktiveco. Mi ekloĝis ĉi tie en aprilo 2012. Sola loĝanto ricevis unu malgrandan ĉambrojn, familio kun du homoj, du ĉambrojn, kaj familio kun pli da homoj, tri ĉambrojn.

En mia domo en Takanokura forteco de radioaktiveco estas 2,2 mikrosivertoj, do estas tro danĝere loĝi tie, sed la registaro decidis, ke mia distrikto estu “loĝebla loko” kaj

ĉesis doni al ni kompensan monon, do mi vivtenas min per pensio kaj ŝparita mono. En mia distrikto antaŭe loĝis 85 familioj, sed nun loĝas nur 3 familioj.

Viro apud li diris:

Mi estis bovisto de 35 jaroj. Kiam mi revenis hejmen post la nuklea akcidento, ĉiuj bovinoj estis skeletaj. Mi iel vivas ĉi tie, sed la plej malfacila afero estas, ke mi havas nenion por fari. Neniam uzante kapon, mi nur manĝas, dormas kaj televidas sencele. Antaŭe mi laboris partatempe en la nukleaj centraloj. Oni kredigis al ni, ke la nukleaj centraloj estas absolute sekuraj, sed mi sciis, ke nenio absoluta ekzistas.

Mi sola vizitis viron en la apuda dometo. Li klarigis sian vivon:

Kiam mi estis juna, mi estis piloto de la japana armeo, kaj mi kandidatiĝis al kamikazo, sed antaŭ ol mi flugos, la milito finiĝis. Poste mi revenis ĉi tien kaj komencis varti bovinojn. Post la nuklea akcidento, mi revenis hejmen kaj trovis, ke ĉiuj 30 bovinoj estis skeletaj. Eble aproj formanĝis ilian viandon.

Dum la dua mondmilito li proksimiĝis al la sojlo de morto kaj nun li suferas pro la maljusta energipolitiko. Li havas sufiĉan kialon por koleri kontraŭ la registaro kaj TEPCO, sed ŝajnis al mi, ke li ne havas malkontenton pri la nuna vivo. Li eĉ diras: “La vivo ĉi tie estas agrabla”.

Ankaŭ tiuj 6 homoj neniam esprimis sian koleron aŭ malamon al la registaro kaj TEPCO. Ŝajnis, ke ili akceptis sian nunan vivon kiel sian sorton, sed kiam mi iris ekster la kunvenejo kaj trovis la suban anoncon, mi hontis pro mia surfaca kompreno.

Konsultejo pri via koro

Psikiatro Sooma Hiroŝi

Ne sola afliktiĝu!

Venu al mi tiuj, kiuj

havas neesprimeblan koleron,
havas koleregon kontraŭ TEPCO,
malesperas pri sia estonteco,
ne scias, kiel plu vivi,
ne povas antaŭvidi sian estontecon,
estas frakasitaj de afliktiĝo.

Jam 4 jaroj pasis, sed nenio solviĝis, male ĉio pli serioziĝis. En tiu situacio, ili agas kaj parolas, kvazaŭ ili ne havus suferojn, sed en sia koro profunde troviĝas malĝojo kaj malespero. Ili estas tiel malfortaj, ke ili havas neniun elekton krom sidi silente kaj senespere. La registaro kaj TEPCO, profitante ilian malfortecon, neglektas ilin kaj ne plu volas zorgi pri ili, pretekstante tempopason de 4 jaroj kaj celante ŝpari kompensan monon.

Ni vizitis la urbon Namie

La nuna situacio de la urbo estas jene:

1. La nombro de la loĝantaro antaŭ la akcidento estis 21000, sed nun 19000.
2. 70% de la loĝantaro rifuĝis en la gubernio Fukuŝima kaj 30%, en aliaj gubernioj. 3700 homoj loĝas en provizoraj domoj en 30 lokoj en Fukuŝima.
3. La urbo aranĝas “esterurbajn komunumojn” en la urboj Minami-Soma, Nihonacu kaj Iŭaki, konstruante “apartamentarojn por restariĝo”. Ĝi dislokis “subtenantojn por restariĝo” en 10 lokoj en aliaj gubernioj.
4. La ĉefa administrejo de la urbo nun sidas en la urbo Nihonmacu, sed ankaŭ en la oficejo en Namie 40 homoj laboras.

Laŭ la urba plano por restariĝo, ĝi faros bazon en la loko, kiu baldaŭ fariĝos “loĝebla”, kaj pli vastigos tiun lokon, aranĝante diversajn funkciojn por la loĝantoj. Kaj la urbo antaŭvidas, ke kiam la tuta urbo loĝeblos en 2017, la nombro de la loĝantoj estos 5000 (2500 familioj), sed laŭ enketo inter la loĝantoj (aŭgsto 2014),

Mi volas reveni al la urbo tuj aŭ iam:	17,6%
Mi ankoraŭ ne decidis:	24,6%
Mi decidis ne reveni:	48,4%

Certe tiuj, kiuj vols reveni, estas gemaljunuloj, do antaŭvideblas malapero de la urbo post nelonge.

Jen la pejzaĝo antaŭ la stacidomo Namie:



La dozmetro antaŭ la stacidomo montras 0,628. Laŭ mia dozmetro la cifero estis 1,23 mikrosivertoj. En tiu forte radioaktiva loko neniu volas/povas loĝi.



Biciklo-parkejo. Sur la ŝildo estas skribita “Helpu kun amo ĉiujn geknabojn kiel la viajn”. La bicikloj restadas ĉi tie ekde tiu tago.



Faskoj da ĵurnaloj en ĵurnalvendejo. Sur la fronta paĝo dancas vortoj “Eksplodo de la reaktoroj!” Ĵurnaloj venis, sed la loĝantoj forkuris.

Ni iris al la distrikto Ukedo, kiu estis detruita de la cunamo. Kiam mi venis ĉi tien antaŭ unu jaro, sur la kampoj naĝis ŝipoj, sed jam ili malaperis.

La elementa lernejo Ukedo sidis en la sama stato. Ni povis vidi detruitajn ĉambrojn kaj grandan salonon kun putrinta planko. En la suba foto la lerneja konstruaĵo estis en nebulo. Ial ŝtonaj ranoj rigardis nin.



Per buso ni trapasis la urbon Futaba. Tie staris fama ŝildo, sur kiu estas skribita “Atomenergio estas energio por luma estonteco”. La urbo volas forpreni ĝin, pretekstante, ke ĝi malnoviĝis kaj danĝeriĝis, sed la kialo certe estas alia. Eble la registaro kaj TEPCO trudas la

urbon fari tion, ĉar tiu ŝildo klare montras, ke atomenergio estas energio por malluma estonteco.



Tiu ĉi devizo, kiun kontribuis s-ro Oonuma Juuĉi 39-jara loĝanta en la gubernio Ibaraki, tiutempe lernanto en la urbo, estis starigita en marto 1988. Li vizitis la urbon en marto kaj proponis, ke la devizo estus konservata kiel minusa heredaĵo, ĉar ĝi klare montras homan stultecon.

Ĉi tie mia dozmetro montris 2,57 mikrosivertojn en la buso, do certe ekstere la forteco estis duobla, tamen en tiu loko troviĝis gardistoj sur stratoj.

Fine mi tradukos poemon versitan de s-ro Ito, tiutaga gvidanto.

何が起ったのか

家があり、
田畑があり、
山も、海も穏やかに、
ある。

毎日朝が来て、
夜が来る。
風が吹き、
時には雨も降る。

だがそこには誰もいない。
人のいない、人が住めない、
ふるさとが、
ある。

そんなことが、
福島県の浜通りで起った。
「はまどおり」
何と響きのいい地名だ。
そこは阿武隈高地の
里山が連なる「あぶくまこうち」。

そこでは、
風には薫があった。
雨には色彩があった。
朝日には力が溢れていた。
夕日には慈愛があった。

21 世紀の初頭、
福島でのその地では
風から薫が消え、

Kio okazis?

Troviĝas domoj
kaj kampoj,
troviĝas mildaj
montoj kaj maro.

Ĉiun tagon venas
mateno kaj nokto.
Ventas
kaj foje pluvas.

Sed neniu loĝas tie,
troviĝas karaj vilaĝoj,
kie malaperis homoj,
ne povas loĝi homoj.

Tia afero okazis
laŭ “Hamadoori”,
la marbordo de Fukuŝima.
Kiel bele tiu loka nomo sonas!
Situas inter la montoj ankaŭ
Abukuma-kooĉi

Tie
la ventoj havis bonan odoron,
la pluvoj havis belajn kolorojn,
la matena suno havis forton,
la vespera suno havis amon.

Komence de la 21a jarcento
en tiu regiono de Fukuŝima
malaperis odoro el la ventoj

雨から色彩がなくなり、
朝日も夕日も
遠い追憶になってしまった。
いったい何が起こったのか。

malaperis koloroj el la pluvoj
la matena kaj la vespera suno
nun restas nur en nia memoro.
Kio, ve, okazis?

HORI JASUO

